

Bulgara **ESPERANTISTO**



LAŬDINDE !

E-societoj, kiuj en 1977 j. varbis pli da membroj ol en 1976. La ciferoj en krampoj rilatas al 1976 j.

Loveĉ — E-societo „Balkaro“, uzina — 55 (40)

Trojan — E-societo „Balkana Stelo“ — 90 (60)

Dospat — E-societo „Fajrero“ — 222 (200)



La Arkeologia E-brigado laboras (vd. paĝon 12)

1 la mezlerne'ana internacia E-tendumado apud Szolnok, Hungario (220 partoprenintoj)



ENHAVO

* * Al la popoloj, la parlamentoj kaj la registaroj de ĉiuj landoj en la mondo	1
Penka Papazova. Renkontiĝo post tridek jaroj	3
E. Dolmatovskij. Ĉu estas veroj du aŭ unu ?	3
A. Stecenko. Trans jaroj irenda	3
M. Balikova. Sindone	6
F. Mileva. VII Foira Internacia E-Renkontiĝo	7
K. Vălev. Neforgeseblaj tagoj en Velingrad	8
Nadia Andrianova. Ĝis revido, sorĉa Velingrad !	8
Georgi Dimov. Ĉu oni povas semi en oceanon kaj rikolti ?	8
Fani Mihajlova. Amika kunagado inter la esperantistoj de Plovdiv kaj Lajpcig	9
N. Aleksiev. Amikeco kun la granda patrio de Oktobro	10
Ek. Majburova. Esperanto en la konservatorio de Kiev	10
Dimitro Papazov. La 34-a kongreso de TEJO estas sur la sojlo	11
Genĉo Cokanov. La 33-a kongreso de TEJO	11
D. Atanasova, I. Vojnov. Mezlernejana arkeologia E-brigado	12
Nikola Aleksiev. Kolorriĉa figuro	12
S. Podkaminer. Socialismo kaj internacia lingvo	14
N. B. Publika rekono de la esperanjista agado en GDR	16
G. Harizanov. Bulgaraj junpioniroj-esperantistoj ekskursis eksterlande	III
Belka Beleva. Dek jaroj de PIF en Zagreb	III
* * Kafejo „Esperanto“ en Vroclavo	III
* * Harijs Skuja E-poeto	III
* * Nekrologoj pri Rudi Grætz, Roza G. Dramova	IV

Sur la kovrilpaĝo :

Grupo el la partoprenintoj en la III Esperantista Ferio-Seminario en Velingrad antaŭ la feriejo (vd. paĝon 8)

Redakta komitato

Kunĉo VĂLEV (ĉefredaktoro), Nevena ALEKSIEVA, Marin BĂCEV, Ljuba BOJAĜIEVA, Ĥristo GOROV, Asen GRIGOROV, Dimitro DENĈEV, Dimitro HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Haim LEVI, Vasja PETROVA.

Korektis : Rajna Konstantinova

Sofio, p. k. 66

Tel. 31-00-29



Lige kun la 60-jara jubileo de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio CK de KPSU, la Supera Soveto de USSR kaj la Ministra Soveto de USSR akceptis mesaĝon de paco kaj bona volo. Ni opinias tiun mesaĝon ege grava por ĉiuj homoj kaj popoloj sur la tero, tial ni donas ĝin ĉi-sube (kun kelkaj mallongigoj).

AL LA POPOLOJ, LA PARLAMENTOJ KAJ LA REGISTAROJ DE ĈIUJ LANDOJ EN LA MONDO

Antaŭ ses jardekoj en Rusio, sur la tero de du kontinentoj — Eŭropo kaj Azio — estiĝis socialisma revolucio kaj komenciĝis efektiviĝo de la testamenta revo de la homaro — konstruo de socio, kie la laboro ne estas ekspluatata, kie regas sociala justeco, kie anstataŭ malkonkordo triumfas amikeco inter la popoloj.

La titanaj streĉoj de la soveta popolo, ĝiaj oferoj, ĝia neŝancebla kuraĝo alportis siajn fruktojn. Ni konstruis maturan socialisman socion. Ni kreis la unuan en la mondo ŝtaton, en kiu fideinde estas defendataj la bazaj interesoj de la laboruloj, reale kaj plene estas garantiitaj la rajtoj kaj la libero de ĉiu popolo kaj nacio, de ĉiu civitano. Koncentrita rezulto de la sesdekjara evoluo de la soveta ŝtato estas la nova Konstitucio de USSR.

La soveta popolo fieras pri tio, kio estas atingita. Hodiaŭ ni starigas antaŭ ni novajn, ankoraŭ pri altajn celojn kaj ni bone komprenas la komplikecon de la problemoj, kiujn ni devas solvi. La sovetaĵoj, intime unuiĝintaj ĉirkaŭ la Komunista Partio kaj la Soveta Registaro, certe marŝas al efektiviĝo de la komunista idealo, kiu enkorpiĝas en si pacon, laboron, liberon, egalecon, fratecon kaj feliĉon por la popoloj.

Tiuj, kiuj marŝis post la Komunista Partio, post Lenin en 1917, estis konsekvencaj internaciistoj. Ili batalis por la feliĉo ne nur de sia popolo. La Oktobra Revolucio radikale ŝanĝis la iradon de la tutmonda historio. Post la Lando de la Sovetoj la socialisman vojon elektis ankaŭ aliaj landoj — en Eŭropo, Azio, Latinameriko kaj Afriko. Grandegajn politikajn kaj soci-ekonomiajn sukcesojn atingis la internacia laborista kaj naciliberiga movadoj. Disbatita estas la kolonia sistemo. Grandaj kaj malgrandaj popoloj ekhavis kredon en siaj fortoj, en la neforprenebla rajto esti mastroj de sia propra sorto. Plivzstiĝas kaj fortikiĝas la ĝenerala demokratia movado. Ĉiam pli laŭte sonas la voĉo de la pacamaj fortoj, de la junularo kaj la virinoj.

Dum ses postoktobraj jardekoj la homaro faris grandan paŝon antaŭen. Nerekoneble ŝanĝiĝis la mondo. Sed ankaŭ nun antaŭ la homaro staras plej akraj problemoj, atendantaj sian solvon.

La atingoj de la homa genio, la senlimaj eblecoj de la scienca-teknika progreso hodiaŭ povas certigi por ĉiu popolo, por ĉiu familio, por ĉiu homo



dignan vivon. Dume sorto por grandegaj homamasoj en multaj landoj ankoraŭ estas la malsato, malsanoj kaj analfabeteco, senrajteco kaj timo antaŭ la morgaŭa tago, mizera malfeliĉa maljuneco. Multaj milionoj estas kondamnitaj je senlaboreco, senigitaj je sia natura rajto — la rajto je laboro. El la vizaĝo de nia planedo ne estas forigitaj la koloniismo, faŝismo kaj rasismo. Kaj fine, la ĉefa — ne estas likvidita la minaco de nova mondmilito, ne estas forigita la minaco de termonuklea katastrofo.

La alvoko al paco estas skribita sur la flago de la Soveta Ŝtato jam en la horo de ĝia naskiĝo. Kaj jam ses jardekojn la Soveta Ŝtato faras ĉion por defendi ta pacon. La persista batalo por paco, kontraŭ la vetarmado, por ĝenerala kaj plena senarmiĝo — tiuj noblaj celoj de la soveta ekstera politiko estas fiksitaj en la Konstitucio de USSR. Tia estas la volo de nia popolo, kiu bone konas kaj la prezon de la „varma“ milito, kaj la prezon de la „malvarma“ milito.

Dum la lastaj jaroj per la komunaj penoj de ĉiuj, por kiuj la paco estas kara, estiĝis ebla en la internaciaj rilatoj atingi turniĝon de konfrontado al malstreĉo, al interkomprenemo kaj egalrajta kunlaborado. Sed por bonanimeco ne estas kaŭzo.

Sur la vojo de la malstreĉiĝo oni starigas seriozajn barojn. Senprudente oni plirapidigas la vetarmadon, kiu fariĝas ekstreme danĝera. La militarismo ne nur englutis kolosajn rimedfontojn, sed ankaŭ kreas realan minacon por la tuta homaro.

Grandegan respondecon prenas sur sin tiuj, kiuj anstataŭ vero semas mensogon, anstataŭ amikeco — malpacon. Tiu, kiu anstataŭ al politiko de paco tiras denove al „malvarma milito“, puŝas la homaron al nuklea katastrofo. En nia jarcento ne estas kaj ne povas esti alternativo de la paca kunezistado.

Ni adresas nin al la popoloj, al la parlamentoj kaj la registaroj de ĉiuj landoj kun alvoko fari ĉion por ĉesigi la vetarmadon, malpermesi la kreadon de novaj rimedoj de amasa mortigado, ekpaŝi al reduktado de la armiloj kaj la armitaj fortoj, al malarmiĝo!

Ni insiste alvokas al plej balbaŭa kaj justa reguligo de la eksplodigaj konfliktoj, al likvido de ĉiuj fajrujoj de internacia streĉo!

Popoloj, laboruloj, homoj kun bona volo el ĉiuj landoj! La afero de la paco, de la malstreĉo, de la socia progreso — tio estas komuna esenca afero! De la unueco kaj la firmeco dependas la sukceso! La fortoj de milito kaj reakcio cedos antaŭ la unuigita volo al paco!

En la nomo de la 260-miliona soveta popolo ni solene deklaras:

La Komunista Partio de Sovetunio, la Supera Soveto de USSR, la Soveta Registaro, nia tuta popolo ankaŭ estonte kun tuta kuraĝo batalos por firmiĝo de la paco kaj la paca kunezistado, por ĉesigo de la vetarmado, por reduktado de la armiloj ĝis komuna kaj plena malarmiĝo sub severa internacia kontrolo.

La Komunista Partio de Sovetunio, La Supera Soveto de USSR, la Soveta Registaro, nia tuta popolo ankaŭ estonte subtenos tiun, kiu defendas la liberon kaj sendependon de la popoloj, kiu batalas por la noblaj idealoj de humanismo kaj socia justeco.

Sovetunio, fidela al la testamentoj de Lenin, ankaŭ estonte marŝos sur la vojo de paco, demokratio kaj socialismo!

CENTRA KOMITATO
DE KPSU

SUPERA SOVETO
DE USSR

MINISTRA SOVETO
DE USSR



III premio en la
Literatura Konkurso

Penka Papazova

RENKONTIĜO POST TRIDEK JAROJ

Saŝa,
ĉu vi povas rekoni hodiaŭ
mian patrujon,
florantan kiel blanka printempo? ...

Saŝa,
estu bonveninta
post tridek jaroj!

Feliĉa mi estas
de nia renkont'!
Vi trapasis la vojon de la milito,
vi vidis multe da sango kaj larmoj. . .
La liberon vi alportis al mia patrujo,
ni renkontiĝis kun vi
kiel fratoj.

La tempo nevideble foriris,
pasis tagoj kaj jaroj plenaj je labor'...
Ni maljuniĝis, la patrujo ekfloris.
La libero eterne kunigis nin.

Nun denove ni renkontiĝas feliĉe.
De kie komenciĝu la interparol'?
Por frata, por fidela amo
la tempo ne ekzistas.
Rusa lando, rusaj fratoj niaj,
vi alportis al ni dufoje liberon!
Kiel vi ne estas similaj en la mondo —
lukti por la paco,
por la homa feliĉo
sen profit'!

II premio en la
Literatura Konkurso

Eŭgeno Dolmatovskij

* * *

Ĉu estas veroj du aŭ unu?
Se du — el ili kiu pravas,
radias kiel hela suno
kaj certe kaj eterne gravas?

Mi ne rekonas verojn du,
se eĉ donitaĵ kun sukero,
por mia rev' mi luktos plu,
la koron donos por la vero.

Kaj kio estas konscienc',
honoro, devo, sinofero?
Ĉi ĉio estas la esenc'
de nia sola, nura vero.

El la rusa: Ekaterina Majburova

II premio en la
Literatura Konkurso

A. Stecenko

TRANS JAROJ IRENDĀ

Se vi petas, mi rakontos. Tio estas
iom longa historio. Sed unue aŭskultu
mallongan enkondukon.

Vi eble scias, ke en 1818 j. Franc
Ŝubert (Franz Schubert) komponis
por Beethoven variaciojn por kvar-
mana ludo. Li alvenis en la hejmon
de la eminenta komponisto por per-
sone enmanigi la donacon. Beethoven
tre ŝatis la muzikaĵon kaj ofte ludis
ĝin kun sia nevo. Inter la variacioj
estas jen gajaj, jen malgajaj, jen mal-
trankviligaj, jen triumfaj, koncize
dirite — nia juneco. . .

— — — — —

En la somero de 1944 jaro mi fa-
rigis deksepjara. Belega evento! Mo-
tivo de ĝojo, de helaj esperoj! Sed mi
ne festis la naskiĝtagon, ĉar mia ge-
patra vilaĝo, situanta proksime de
rivero Dnjestro, estis en la okupita
soveta teritorio. Kiel ĉiuj ceteraj
(ili estis maljunuloj, virinoj, infanoj),
mi vivis timante la malamindajn
okupantojn, kiuj ĉiam montris sin
turmentantoj kaj rabistoj. Sed iliaj
tagoj ĉe ni estis jam kalkulitaj. La
trupoj de la Ruĝa Armeo rapide al-
proksimiĝis pelante la hitleranojn al
okcidento, kaj mi senpacience atendis
liberiĝon, jam vidis min rekruto kaj
batalanto kontraŭ la sovaĝuloj.

Sed la sorto ordonis alion. Ne aten-
dite mi estis kaptita dum amasa tra-
serĉado. Min kaj multajn aliajn oni
perforte envagonigis kaj tuj ekveturi-
gis al Germanio kiel sklavojn.

Tio estis terura. Ni ĉiuj, junaj ge-
knaboj, estis forte afliktitaj kaj dumvoje
pensis nur pri fuĝo. Provis ĝin mul-
taj, sed neniu sukcesis. La gardistoj

ilin kaptis kaj kruele batis, kelkaj estis mortpafitaj aŭ vunditaj.

Mi kun tri samvilaĝanoj decidis eskapi sen risko. Ni zorgeme preparis forkuron, ĉion observis kaj atendis konvenan momenton. La trajno veturis kaj veturis, la tagoj forpasis, en la kradita fenestreto de la ŝarĝvagono aperis kaj malaperis fervojstacioj. En la kvina tago ni jam estis en Krakovo, poste venis Nisa, la matenon de la sekva tago Ljublin kaj vespere Gyorlic. Tio por ni estis granda bato, ĉar Gyorlic estas jam Germanio. Ni decidis: nenia prokrasto plu, ĉi-nokte ni nepré devas fuĝi.

La vetero favoris nin. La ĉielon dense kovris nigraj nuboj, pluvetis. La soldatoj jam ne tre atente gardis, opiniante, ke ne estas senco forkuri ĉi tie, inter germanoj, ĉar ĉiun fuĝanton oni kaptos.

En la densa nigro de la nokto ni unu post la alia forlasis la vagonon. Mi, kiel respondeculo, saltis lasta kaj falis sukcese, nur iom kontuzinte la brakon. Kiam malaperis la lumeto de la lasta vagono, mi min levis kaj ekpaŝis. Estis plena nigreco, mi vidis nenion kaj foriradis de la fervojo palpanfe. Kelkfoje mi stumblis, falis kaj baldaŭ puŝiĝis je dika trunko de arbo. Iri plue signifis trafi en novan lupan buŝegon. Mi decidis ĝisatendi la tagiĝon kaj tiam elekti vojon.

Mi eksidis sur la malsekan teron apud la arbo. Estis plena silento, nur najbare murmuris roĵo. Plezure la pulmoj enspiris la aeron kun freŝa aromo de falĉita herbo. Mi, filo de kamparano, tre ŝatas la fojnan odoron. Sed kun teruro mi komprenis, ke tie ĉi la fojno estas tre danĝera. Iu homo, iu reprezentanto de la popolo, kiu sendis la kruelajn banditojn militataki kaj turmenti mian patrujon, antaŭ nelonge falĉis ĉi tie herbon. Se li alvenos, mi, rusa fuĝanto, ne povus atendi indulgon. Aspektis mi tro suspektinda kaj ne parolis germane. La unua renkontita homo kaptos min, se mi ion demandas. Subite mi

ekmemoris pri Esperanto. Dum du jaroj en la lernejo mi vizitis Esperanto-rondeton kaj bone parolis en tiu lingvo. En okazo de renkonto por mi la plej bona estos apliki la Internacian Lingvon. Tio povus helpi. Almenaŭ mi kaŝos mian rusan devenon.

Pro grandega laco miaj palpebroj kuniĝis. De tempo al tempo ne tre malproksime aŭdiĝis bruo de preterpasantaj vagonaroj. La dormemo ion post iom venkis min malgraŭ mia rezisto per ĉiuj fortoj. . .

Min vekis vira voĉo. Jam iomete tagiĝis. Super mi staris maljuna homo kun forkego en la manoj kaj ion demandis. Pro subiteco mi kvaraŭ rigidigis kaj nur diris:

— Mi perdis la vojon. . . Mi ne scias. . .

— Esperantisto! — ekkriis la homo. — Kia surprizo! Sed ne timu! Ne timu min! — Li rimarkis mian embarasiĝon. — Mi ankaŭ estas esperantisto kaj helpos vin. Kien vi iras?

— Al la arbaro, por, por. . .

— Silentu! La vestaĵo parolas pli bone ol vi. Vi devas antaŭ ĉio ŝanĝi la kostumon. Jen tie mia stako de fojno. Kaŝu vin en ĝi kaj atendu mian revenon.

Li rapide foriris lasante min konsternita. Kiu do li estas? — Germano, sekve faŝisto. Li kondukos homojn, kiuj kaptu min. Mi pretiĝis forkuri, sed subite en miaj okuloj sin ĵetis la forkego. La germano estis lasinta ĝin apude. Kial? La forkego ja estas defendilo. Li ĝin lasis. Sekve li fidis al mi kaj ne havas malbonan intencon. Kaj mi. . . ne forkuris. Jen li aperis. Mi vidis lin alproksimiĝi kun pakaĵo subbrake.

— Rapide ŝanĝu la vestaĵon kaj atente aŭskultu, — diris li. — Mi estas Kurt Hagen, fervojisto. Mia loĝejo situas proksime, apud la fervojo. Sed al ĝi ni ne iros, ne, tie troviĝas diversaj homoj. Mi vin kondukos al mia bona amiko, ankaŭ esperantisto — Gerhard Stuber. Li estas kam-



parano, lia domo situas aparte, li bezonas helpanton kaj kun plezuro akceptos vin. Jes. Ekde ĉi tiu momento vi estas lia gasto, filo de lia belga amiko. Hieraŭ vi alveturis per trajno kaj mi helpas al vi trovi lian domon. Via nomo estas Adrian Koolen. Mi bone konas la amikojn de Štuber kaj iliajn infanojn. Ĉu komprenite?

Post du horoj da irado ni atingis la celon. La kamparano bonkore akceptis min kaj unue faris la plej gravan — nutris min. Ĝis nun mi memoras la bongustan odoron de la kotletoj preparitaj de la dommastrino Erna. Ŝi regalis min kun larmoj, ĉar ŝia filo (pri tio poste rakontis la mastro) trafis en kaptitecon apud Stalingrado.

Dum la unuaj tagoj ĉe Štuber mi neniel povis kredi, ke en faŝista Germanio ekzistas ankaŭ ne malamikoj. Por mi ambaŭ gedommastroj estis bonaj homoj. Ili havis negrandan bienon, fruktoĝardenon, kelkajn ĉevalojn kaj du bovinojn. Kvankam la mastro iomete lamis, li mem kulturadis la teron. La edzino sin okupis pri la bovinoj. Mi bone helpis ilin, ĉar mi scipovis fari la kamparanan laboron.

En libera tempo Štuber rakontis al mi pri sia esperantistigo en la junaĝo, pri sia vasta internacia korespondado. Inter liaj amikoj estis ankaŭ mia samlandano — ukraina argonomo. Ties leterojn kaj foton li zorge konservis, kvankam ne sen risko. Foje li montris kaŝitan insignon — verda stelo — kaj diris:

— Mi ne dubas, ke iam mi malkaŝe kaj fiere ĝin portos!

Štuber estis muzikema homo. Li havis elektran gramofonon kaj multe da diskoj. Inter ili la plej ŝatataj por li estis la variaĵoj de Šubert. La kamparano helpis al mi kompreni kaj ŝati la genian verkon.

— Ĉiu variaĵo, — eksplikis li, — similas al diversa humoro de la homo. La temo estas malgaja, sed kuraĝa. La variaĵoj emfazas jen unu, jen alian flankon de la temo kaj en la finalo la komponisto kun mirinda majstreco

transformas la minoran temon en triumfan majoran marŝon.

Multfoje mi aŭskultis la komponaĵon kaj travivis diversajn sentojn. Kaj ĉiam la lasta estis venka, batala. Iufoje mi aludis al Štuber, ke mi ŝatas tian finalon, kian havas la variaĵoj.

— Ĉu jam ne estas finenda la gastado de Adrian Koolen? — demandis mi. — Ĉu li havas rajton ripozi dum tempo, kiam hejme estas tiom da laboro?

La saĝa homo ekmeditis kaj respondis:

— Eble tiel. Sed nur Kurt komprenas bone tiujn aferojn. Mi konsultigos kun li.

Kaj vere! Post semajno Štuber gajigis min dirante, ke la fino de mia gastado proksimiĝas. Li konsilis al mi pli kaj pli multe paroli germane. Tion mi volonte faris.

Iun vesperon alvenis Kurt gaja. Tiam Gerhard donis al mi malgrandan valizon kaj diris solene:

— Ni jam disiĝos, mia gasto! Mi deziras al vi feliĉe travivi la malbonan, danĝeran tempon. Mi deziras ankaŭ, ke vi memoru kaj portu trans la jaroj vian propran opinion, ke en Germanio ne ĉiuj estas frenezaj.

— Ankaŭ ne la esperantistoj! — aldonis Kurt. — Esperanto helpis ilin pli profunde kompreni la nunon kaj la estonton.

Mi sincere dankis ilin, promesis ĉiam memori iliajn vortojn. Post manpremoj kaj larma kiso de Erna, Kurt forkondukis min.

En la stacio li transdonis min al Majnolf, ankaŭ fervojisto. Mi estis kvazaŭ lia nevo kaj gasto. Li ne parolis Esperante, sed mi jam komprenis iomete germanan, kaj tio sufiĉis. Mi ne devis paroli, nur aŭskulti kaj kompreni. Enirante vespere en ofican vagonon ni ambaŭ tuj ekdormis.

Malfrue nokte Majnolf vekis min kaj ni elvagoniĝis sur la kajo de malgranda senhoma fervojstacio situanta inter montoj. Mi eksciis, ke ni jam troviĝas en Ĉeĥoslovakio. Al ni venis

nekonata viro, kiu premis miajn manojn. Majnolŝi diris al mi:

— Iru kun li, li bone konas la vojon. Adiaŭ!

Kiam la ĉielo oriente icm heliĝis, ni ekpaŝis al la montoj. La vojo estis longa, tre laciga. Kiam miaj fortoj ŝajnis plene elĉerpiĝi, ni atingis la celon — partizanan taĉmenton. Ho, kiel feliĉa mi estis! Mi konatiĝis tie kun novaj homoj — ĉeĥoj, slovakoj, germanoj, eĉ rusoj. Inter ili mi trovis bonajn amikojn. Nur tie mi sentis min libera soveta homo. En la taĉmento mi batalis kontraŭ la hitleranoj ĝis alvenis la Ruĝa Armeo. Post la fino de la milito mi revenis hejmen kiel partopreninto en la tutmonda batalo kontraŭ la fortoj de mallumo kaj tiraneco.

Niaj aktivuloj

SINDONE

Du grandaj albumoj, pitoreska amaso el centoj da leteroj el ĉiuj sovetaj respublikoj, el Kubo kaj Usono, el Brazilo kaj Indonezio, el Jugoslavio, Pollando, Francio kaj Anglio, el Rumanio kaj Turkio, el GDR kaj GFR, el Japanio kaj la Kanariaj Insuloj. Tie loĝas la homoj, kun kiuj korespondas Kanju Kanev — la prezidanto de Esperanto-societo „Kolombo de la Paco“ en urbo Gâlâbovo (Kolombourbo), distrikto de Stara Zagora. Homoj de diversaj haŭtkoloroj, kun diversaj politikaj konceptoj. Sed ligitaj de komuna ideo: „La paco devas triumfi sur la tero!“ En ĉiuj anguloj de la planedo estas niaj samideanoj, kiuj scias pri la energikomplekso „Marica-Iztok“, pri la panonaska humo de Trakio, pri la urbo de la energetiko Gâlâbovo. Por tio kontribuis unu energia juna homo, la vero pri kiu ŝajnas nekredeble troigita.

Ankaŭ li, kiel ni, estas tre okupata kaj per ofica, kaj per socia, kaj per familia laboro: estro de la kontraŭincendia servo de la Termoelektra Centralo „La Unua Komso-mola“, partia sekretario, patro de tri infanoj. Kaj malgraŭ ĉio dum malpli ol tri jaroj li kreis en Gâlâbovo Esperanto-societon, kiu nun nombras 80 membrojn kaj okupas la unuan lokon en la distrikto!

Ce li amo al la internacia lingvo naskiĝis iel spontane: li estis en la IX klaso, kiam en liajn manojn trafis Esperanto-bulgara

Jen estas ĉio. Kiel vi komprenas, mi povis pere! Dank' al feliĉa okazo mi renkontis prudentulojn inter frenezuloj kaj mi plenkore dankas tiun okazon, kiu alkondukis Kurt Hagen aerumi skue la fojnon post pluvo. Interalie la Esperanto-insignon, kiun nun mi portas, mi trovis en la valizo donacita de Štuber

Vi havas aliajn demandojn? Vin interesas la sortoj de miaj tri kunekapintoj? Mi nenion pri ili scias. Hejmen revenis neniu. Eble ili laboris en sekreta produkto kaj fine oni ilin mortigis. Aŭ alimaniere ili pereis.

Cu mi havas kontaktojn kun Kurt kaj Štuber? Ne, kvankam mi ilin serĉis. Ili eble translokiĝis. Aŭ jam forpasis. Sed ili ĉiam vivas en mia memoro.

vortaro. Kanju restis ĉarmita de nova kompreno: „Mi povos paroli kun la tuta mondo! Kelkajn jarojn poste, en la mallongaj horoj de forpermeso, unu malgrasa soldato nefoje ekstaris antaŭ la klubejo de E-societo „Verda Stelo“ en u. Stara Zagora. Iun tagon, kiam li staris antaŭ la klubeja vitrino, preterpasis lin impona plenaĝa viro. La viro alparolis lin amike. Tiel Kanju konatiĝis kun la elstara veterano de la E-movado en Stara Zagora Rajno Ĝipilev, homo, kun kiu ekde tiu ĉi momento lin ligas sincera amikeco jam duan jardekon. Ĝipilev donis al li fortan puŝon antaŭen — al rapida kresko kiel E-aktivulo.

En la printempo de 1974 en Gâlâbovo oni fondas E-societon. Pri tio multe insistis Ĝipilev: li jam bone konis la junan homon, konis lian seriozan vojon de aktivulo kaj en la veterinara mezlernejo, kaj en la kursoj por rezervaj oficiroj en Sofio. Merite li estis sendita al la landa E-festivalo en Dimitrovgrad, kiel delegito de la nacia E-kongreso en Pleven, al la kongreso de TEJO en Vraca (Bulgario) kaj Pécz (Hungario). La fonda kunveno — 20 personoj. Iuj jam ardas pro deziro lerni Esperanton, aliaj estas venintaj pro scivolemo. Sed ĉiuj restas! Kaj hodiaŭ estas kvaroble pli!

La aŭtunon komenciĝas la vera vivo de „Kolombo de la Paco“ — kaj organiza, kaj kleriga, kaj... simple amika. La membroj





senpacience atendas la malfermon de la E-kurso. Kaj komenciĝas turmenta serĉado de konvena kursejo. Oni kolektiĝas en librejo, en iu kancelario. En varmaj tagoj la lernohoroj okazas eĉ sur la benkoj de ĝardeno! Sed kun ia gaja junula aŭdaco kaj miriga persisto konstante tra la urbo estas aŭdebla: „Saluton, kara samideano!“

La nova E-societo kreas intimajn ligojn kun la esperantistoj el la distrikto. En Ĉirpan kaj Dălboki, ĉe la celebroy de la 50-jariĝoj de la lokaj E-societoj, la ĝalâbovanoj estas ŝatataj gastoj: ili ja famiĝis kiel kantistoj, instrumentludantoj, humoristoj,

recitantoj.

En julio 1975 j. 18 personoj partoprenis la E-festivalon en Karlovo. Unu el ili, Boris Kostov — humoristo kaj kantisto, konfesas: „Mi estis ripozanta en Miĉurin, ĉe Nigra Maro. Iun tagon frue antaŭtagmeze Kanev alvenis per sia aŭto por veturigi min al Karlovo partopreni la festivalon. Poste reveturigis min al Miĉurin. Ĉu ĉe tia gesto oni povas ne taksi alte kaj ne estimi lin? Li estas senprofite fidela al nia E-afero, el tuta koro kaj animo! Li intense klopodas, ke la laboro de nia societo marŝu bone. Kaj neniam eĉ aludas pri sia persona kontribuo al nia progreso. Dank' al li ni interamikiĝis kun tiom da homoj el la tuta mondo!“

Kanev sukcesis vekti la aktivecon de siaj geamikoj, malgraŭ ke la konsisto estas tre varia — ĉi tie estas kaj homoj kun blankaj haroj, kaj kun lernejana kepo. „Giu povas esti utila!“ — tio jam estas regulo en la laboro, kaj oni aplikas ĝin ĉe ĉiuj iniciatoj. Gaje kaj kompanie ĉiuj partoprenis ankaŭ libervolan labortagon helpe al la Agrar-Industria Komplekso.

Bone prezentis sin la esperantistoj el Ĝalâbovo ankaŭ ĉe la interdistrikta E-renkontiĝo en Samokov. Kaj la salutparoloj de Kanev, kaj la vigla, senĝena partopreno en la vespera programo atestis pri vivĝoja, disciplinita kolektivo. Tiaj montriĝis la membroj ankaŭ ĉe la E-renkontiĝo en Budapeŝto ĉi-kaj pasintjare.

Ankaŭ nun la vivo de la societo daŭras kun certa entreprenemo kaj sincero. Cerbo kaj koro estas Kanju Kanev — ĝia prezidanto, membro de la Distrikta kaj Centra Estraroj de Bulgara Esperantista Asocio.

M. Balikova

[VII] FOIRA INTERNACIA ESPERANTISTA RENKONTIĜO]

La VII-a Foira Internacia Esperantista Renkontiĝo (FIER), okazinta en Plovdiv la 8—10-an de septembro, pasis sub la signo de du gravaj datrevenoj: la 60-jariĝo de la Granda Oktobra Revolucio kaj la 100-a datreveno de la liberiĝo de Bulgario el sub otomana jugo. En ĝi partoprenis ĉ. 90 esperantistoj el multaj loĝlokoj de nia lando kaj kelkaj eksterlandaj gastoj. Teresa Dyl kaj Wiesława Kreczkowska el Pollando pasintjare gajnis premion el la konkurso-viktorino pri Plovdiv, kiun organizis E-societo «Kulturo», kaj nun ili gastis al la esperantistoj de Plovdiv dum 5 tagoj. La renkontiĝon partoprenis ankaŭ la mongola esperantisto U. Asalbaj.

La interkona vespero okazis en kafejo

«Luksor». Tio estis kelkaj agrablaj horoj en amika atmosfero. La 9-an de septembro antaŭtagmeze ni vizitis la Monteton de la Liberigintoj, kie ni metis florkronojn antaŭ la monumentojn de la rusa armeo kaj de la soveta soldato. Veselina Kurteva, prezidantino de «Kulturo», parolis omaĝe al la rusaj soldatoj, kiuj antaŭ 100 jaroj helpis al nia longe suferinta popolo liberiĝi el sub la nigra 500-jara otomana jugo. Post komuna tagmanĝo en la E-klubejo okazis viktorino pri la Oktobra Revolucio, pri la Rusa-Turka Liberiga Milito, pri Esperanto kaj la E-movado. Plej kompetentajn respondojn donis Canko Murgin, Kr. Karucin, V. Kurteva. La 10-an de septembro la partoprenantoj en FIER vizitis la internacian foiron.

F. Mileva

NEFORGESEBLAJ TAGOJ EN VELINGRAD

De la 18 de septembro ĝis la 2 de oktobro en Velingrad okazis la III-a Esperantista Ferio-Seminario, kiun partoprenis ĉ. 37 geesperantistoj el Hungario, Pollando, Sovetunio, Bulgario.

La programo de tiu ĉi aranĝo estis tre riĉa kaj varia: ĉiutaga suna kaj mineralakva banado, ekskursoj, promenadoj, E-lecionoj, projekciado de E-filmoj, amuzvesperoj ka.

Grava momento en la programo estis la ĉiumatenaj mikroturismo kaj gimnastikaj ekzercoj en la ĉarma naturo de Velingrad, abunda je aromo de koniferaĵoj, spiranta freŝan montaran aeron. Ĉio ĉi aktive kontribuis por la tre rapida kaj ĉiufanka vigliĝo kaj firmiĝo de la organismo. Sufarantoj de iuj malsanoj regule trinkis kuracajn akvon el la multnombraj mineralfontoj de la urbo.

La gastoj vizitis la domon-muzeon de la popola heroino-esperantistino Vela Peeva kaj la ekzekutlokon de la fidela popola filo, la kontraŭfaŝisto kaj esperantisto Angel Copev. Kun granda intereso ili trarigardis ankaŭ la fabrikon por perlaboro de marmoro, la meblan uzinon, la ilorplantejon ka.

La programo abundis je ekskursoj al proksimaj kaj malproksimaj lokoj. Aparte fortajn impresojn faris la ekskursoj al Batak kaj la Rila Monaĥejo. En Batak la gastoj rigardis la faman preĝejon kaj la novan historian muzeon, la subteran hidroelektran centralon, la ĉarman Batak-lagon. Ĉio eksciita kaj vidita pri la historio kaj la nuntempo de tiu regiono restas kiel neforgesebla rememoro por ĉiuj. La granda ekskurso kun malproksima celo — ĝis la Rila-Monaĥejo — donis eblecon al la gastoj konatiĝi ne nur kun tiu fama monumento de mezepoka Bulgario, sed ankaŭ kun la ĉarma Rodopi-montaro, ĉirkaŭbraki per rigardo la potencajn korpejn de Rila kaj Pirin montoj.

Aparte grava evento en la ĉi-jara ferio-seminario en Velingrad estis la granda solena kunveno honore al la 60-jara jubileo de la Granda Oktobra Revolucio, organizita de E-societo «Stoju Kalpazanov» kune kun

Nadia Andrianova

Kiev

ĜIS REVIDO, SORĈA VELINGRAD!

Preterflugis fulmrapide tagoj
en Esperantujo nia kara,
helaj tagoj sur la ter' bulgara.
Ni disiĝas, verda amikar'!

Sed forportas ni en la animoj
rememorojn varmajn pri Rodopi.
Velingrado, ĉarma kaj kvieta,
restos por ĉiame en la kor'.

Ne forgesos ni «ekspres-Rodopi»
kaj turismajn forajn piedmarŝojn,
la konkeron de la krutaj pintoj,
la belecon de Ĉepina Val' . . .

Ĝis revid', Orfea valo ĉarma,
Jundola, Rodopi, Belmekeno, —
verda paradiz' neripetebla, —
ĝis revido, sorĉa Velingrad'!

la Patrolanda Fronto, Komsomolo kaj la Popola Legejo «Otec Paisij». La solenaĵo okazis en la salono de la legejo, kiu, malgraŭ la subite tre malboniĝinta vetero, plenpleniĝis. Ĉeestis esperantistoj el multaj loĝlokoj de Suda Bulgario kaj el Sofio. Paroladon pri la Granda Oktobro faris Kunĉo Valev — sekretario de BEA. Centran lokon en la belarta programo okupis la kantohoro «Rodna Pesen» el u. Târgoviște, veninta speciale por tiu ĉi celo. Ĝi prezentis altnivelan programon en bulgara, rusa kaj Esperanto kaj gajnis la ŝtormajn aplaŭdojn de la publiko.

La ĉi-jara ferio-seminario en Velingrad brile sukcesis. La partoprenantoj esprimadis nur per superlativoj sian kontenton kaj pri la belega, pura urbeto, kaj pri la ĝuinda ĉirkaŭaĵo, kaj pri la admirinda energio, iniciatemo kaj organiza talento de la E-veterano Manol Colev — la ĉefa motoro de la tuta aranĝo, kaj pri la helpemo de liaj kunlaborantoj. Estas klare, ke en Velingrad ekzistas ĉiuj favoraj kondiĉoj — objektivaj kaj subjektivaj — por krei stabilan, altnivelan, perspektivan kaj tre ŝatatan internacian aranĝon de la bulgara E-movado.

K. Valev

ĈU ONI POVAS SEMI EN ĈEĈEANON KAJ RIKOLTI?

Nature, ne!

Kiel multjara E-lektoro mi bone memoras la vortojn de la fama E-metodikisto Andreo Ĉe, ke la ĉefa tasko de la instruisto estas kapti la atenton de siaj kursanoj. Ĉar instrui neatentantajn homojn egalas skribi sur akvon. Severece, rigida disciplino, perforta streĝigo de la atento ne helpas, eĉ malutilas. La sola rimedo estas: lerte uzi psikologiajn faktorojn. Tial li sekvas la jenan regulon: ligi ĉiun instruadon al agrabla,

amuzaj travivaĵoj. Tiamaniere ricevitan instruadon oni firme fiksis kaj tenas en la memoro, kaj la instruisto skribas ne sur akvon, sed ĉizas en stonon. Anstataŭ seka lingvokurso li faras agrablan konversacion kun allogaĵoj, dum kiuj la partoprenantoj eĉ senkonscie lernas. Se ekzistas modernaj kuracistoj, kiuj sanigas per rido, kial ni timas provi instruadon per rido?

Tiujn samajn konsilojn de Andreo Ĉe mi ripetis al mia ekskursano Georgi Dobri-



kov, kiu antaŭ du jaroj lernis Esperanton ĉe mi en la Supera Ekonomia Instituto «Dimitro Blagoev» en Varna. La pasintjaraj partoprenantoj en la Internaciaj Kursoj por Instruistoj de Esperanto en Burgas, kv. Meden Rudnik, certe memoras k-don Dobrikov, la ĉefmekanikiston de nia oceana motorŝipo «Kapitan Petko Vojvoda», kiu montris al ni ege interesajn diapozitivojn pri siaj vojaĝoj ĉirkaŭ la mondo per tiu ŝipo. En Burgas li ricevis diplomon por instrurajto de Esperanto.

Antaŭ kelkaj tagoj mi estis agrable surprizita de radiogramo de k-do Dobrikov,

kio tekstis jene: «Bonvolu informi la estraron de E-societo «Albatroso», ke la societaj vicoj plimultiĝis per 15 samideanoj. En la ŝipo mi gvidas kurson de Esperanto, kaj ĉiuj 15 kursanoj fariĝis membroj de «Albatroso».

Do, la pasintan someron Dobrikov diplomiĝis kiel E-instruisto kaj jam semas. Semas en oceanon la mirindajn semojn de la paco kaj internacia amikeco pere de la Internacia Lingvo.

Jes! Oni povas semi ankaŭ en oceanon kaj ricevi bonan rikolton!

Georgi Dimov

AMIKA KUNAGADO INTER LA ESPERANTISTOJ DE PLOVDIV KAJ LAJPCIG

Dum la lastaj jaroj la internacia agado de DE de BEA en Plovdiv serve al nia socialisma socio, al la paco kaj amikeco inter la popoloj konsiderinde plivastigis. Estis starigitaj bonaj kontaktoj kun unuopaj esperantistoj, E-societoj kaj organizoj en diversaj landoj. Plej multaj estas niaj kontaktoj kun esperantistoj el frataj socialismaj landoj. Komence de 1977 j. ni subskribis interkonsenton pri kunlaboro kun la Budapeŝta Teritoria Komitato de HEA. Je la 13-a de septembro ĉi-jare ni subskribis kontrakton pri kunlaboro ankaŭ kun la Distrikta Laborrondo Esperanto en la ĝemela urbo Lajpcig (Leipzig) en GDR.

Niaj kontaktoj kun DLE en Lajpcig datiĝas de 1973 j. Pasintjare reprezentanto de nia DE estis invitita de DLE en Lajpcig partopreni la II-an Centran Konferencen de la Esperantistoj en Kulturligo de GDR, okazintan en la sama urbo. Tie dum interparoloj kun la prezidanto de DLE en Lajpcig Jürgen Haman (Jürgen Hamann) estis pritrakitaj diversaj aspektoj de la kunlaboro inter ambaŭ organizaĵoj. La reprezentanto de la plovdiva DE de BEA estis akceptita en Lajpcig de la I-a distrikta sekretario de Kulturligo, d-ro Fiedler. Li interesiĝis ne nur pri la kultura vivo en Plovdiv, sed ankaŭ pri la E-movado kaj ĉefe pri la eblecoj pere de Esperanto starigi kontaktojn inter diversaj kulturaj institutoj kaj organizaĵoj en ambaŭ urboj.

Ĉi-jare de la 9—14 de septembro trimembra delegitaro de Kulturligo el urbo Lajpcig vizitis Plovdiv. Ĝi estis gvidata de d-ro Fiedler. Ĝiaj anoj estis Wolfgang Becker (Wolfgang Becker) — distrikta sekretario de KL, kaj Jürgen Haman. Niaj gastoj havis utilajn interparolojn kun estraranoj de la

Klubo de Kulturagantoj, kiuj reprezentis diversajn kulturajn institutojn en Plovdiv. Bonrezultaj estis ankaŭ la renkontiĝoj kun estraranoj de la plej granda fotoamatora klubo en nia urbo, kun reprezentantoj de la societoj de filatelistoj kaj numismatoj. Ĉiam la interparoloj okazis pere de Esperanto kaj ni sukcesis montri la avantaĝojn, kiujn la internacia lingvo donas al homoj de diversaj popoloj por bone interkompreniĝi.

Plej fruktodonaj estis la dialogoj inter la delegacianoj kaj la reprezentantoj de DE de BEA. Post interŝanĝo de informoj pri la agado de la koncernaj organizaĵoj ambaŭflanke kaj post preparolo de la komuna agado estis proponita la teksto de kontrakto, kiu devas reguligi la kontaktojn inter ambaŭ distriktaĵoj E-organizaĵoj. La subskribita kontrakto estas kontribuo kaj sukcesa paŝo al realigo de gravaj taskoj de nia agado.

La programo de la restado de niaj germanaj amikoj en Plovdiv estis sufiĉe streĉa kaj laciga, sed ili utiligis ĉiun el la malmultaj liberaj horoj por konatiĝi kun la rimarkindaĵoj de la urbo. La Malnova Plovdiv ravis ilin per sia specifa ĉarmo kaj neripetebla atmosfero. La koncerto enkadre de la Internacia Festivalo de Ĉambromuziko, okazinta en la korto de la Etnografia Muzeo, estis neforgebla travivaĵo. Certe ne estos forgesita ankaŭ la tago, pasigita en Pamporovo. La adiaŭa vespero en la malnovstila restoracio «Páldin» en la Malnova Urbo estis amike varma kaj kortuŝa.

Ni esperas, ke estonte niaj kontaktoj kun DLE en Lajpcig fariĝos pli kaj pli riĉaj kaj tio certe estos kontribuo ankaŭ por la progreso de la E-movadoj en niaj amikaj landoj.

Fani Mihajlova

Cu vi ĵam aliĝis al la Universala Kongreso de Esperanto en Varna? Ne prokrastu! Aliĝu tuj! La bulgaraj esperantistoj devas doni imitindan ekzemplon al ĉiuj!

Kongreso de Esperanto en Varna? esperantistoj devas doni imitindan



Antaŭ certa tempo en Moskvo okazis tre interesa kaj grava internacia konferenco, dediĉita al la 60-jara jubileo de la Granda Oktobra Revolucio. Ĝi estis organizita de la Soveta Asocio de Amikec-Societoj kun Eksterlando (rusa mallongigo: SSOD). La konferenco partoprenis elstaraj kulturaj kaj politikaj agantoj el preskaŭ cento da landoj, reprezentantaj landajn aŭ internaciajn movadojn, kiuj agadas favore por popularigo de la atingajoj kaj la rezultoj de la Oktobra Revolucio en la internacia agado de la Soveta Stato, por konsolidigo de la paco en la mondo.

La Mondpaca Esperantista Movado partoprenis la konferencon per trimembra delegitaro: la prezidanto de MEM, ties vicprezidanto prof. d-ro Magomet Isaev, prezidanto de la Komisiono por Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj ĉe SSOD, kaj la membro de tiu komisiono Vladimir Samodaj.

En la raportoj de akad. P. Fedoseev kaj de la prezidantino de SSOD Zinaida Kruglova, kiel ankaŭ en la dekoj da paroladoj kaj kontribuoj de reprezentantoj el eksterlando, evidentiĝis, ke la movadoj, kiuj fortikigas kaj evoluigas la amikecon kun Sovetunio transformiĝis en gravan socian faktoron de la monda paco. La vorto amikeco senrezerve ligiĝas kun la vorto paco. La vero pri la grandega konstrua laboro de Sovetunio, kiel en ĝia interna vivo, tiel ankaŭ en ĝia eksterlanda politiko, estas la plej bona instrumento por senmaskigo de la mensoguloj kaj intrigantoj el la medioj de la monda imperiismo, strebantaj al izoligo de la grandega soveta lando disde la progresemaĵoj kaj pacamaj fortoj de nia epoko.

Bonegan paroladon en tiu senco faris antaŭ la pleno de la konferenco la prezidanto de la Monda Packonsilio Romeŝ Ĉandra (Romesh Chandra), bona amiko de la esperantistoj pacbatalantoj.

En sia kontribuo la prezidanto de MEM pritraktis la grandegan signifon de la sovet-

landa paca politiko por kreo de forta movado de malstreĉeco en la internaciaj rilatoj de ŝtatoj kun malsamaj sociaj sistemoj. Tiurilate li emfazis la aprobitan en Helsinki fare de la Tuteŭropa Konferenco Finan Akton kaj informis la ĉeestantojn pri la eldonita plena traduko de la Fina Akto en Esperanto. La prezidanto de la kunsido Permjakov, vicprezidanto de la Instituto pri Internaciaj Rilatoj en Moskvo, salutis la porpacan agadon de la esperantistoj kaj emfazis, ke nome en la porpaca batalo ĉiuj honestaj kaj bonvolemaj homoj trovas plej facile komunan lingvon.

Kiel konate, la esperantistaro spontane kaj sincere subtenas la politikon por la plua evoluigo de la malstreĉeco kaj ties transformon en nerenverseblan fenomenon de la internacia politiko. Ni estas konvinkitaj, ke ĝi prezentas la plej fidindan vojon al daŭra kaj justa paco en la mondo, pri kiu sopiras ĉiuj esperantistoj sendepende de siaj ideologiaj konceptoj. Subtenataj de la firma volo de la popoloj por paco kaj amikeco, la politikistoj ĉiam pli kaj pli ekstaros sur realisman pozicion por krei stabilan pacon sur nia planedo. Netakseblan helpon por la realigo de tiu unusola racia alternativo en la vivo de la mondo prezentas la porpaca politiko de Sovetunio.

Devo de ĉiu bulgara esperantisto estas subteni kaj evoluigi la amikecon kun la sovetaj esperantistoj kaj la tuta soveta popolo. Amikeco kaj paco — paco kaj amikeco!

* * *

Post la finiĝo de la konferenco, laŭ invito de SSOD la prezidanto de MEM faris viziton de Tallinn, kie li parolis antaŭ kunveno de esperantistoj. Post sia reveno en Moskvon li faris paroladon en la Domo de Amikeco antaŭ esperantista kunveno.

N. Aleksiev,

[delegaciestro de MEM en la Moskva konferenco]

Esperanto en la konservatorio de Klev

En majo 1977 la Scienca Studenta Societo en la konservatorio de Klev organizis grandan sciencon studentan konferencon. La programo de la konferenco enhavis multnombrajn kaj diverstemajn raportojn, inter kiuj ankaŭ tri pri Esperanto. Raportintoj — membroj de E-rondo funkcia en la kadro de la menciita societo, la studentoj el la III kurso de la muzikologia fakultato de la

konservatorio Luiza Nikolajeva («Kio estas Esperanto?»), Tatjana Smirnova («Esperanto servas pacon») kaj Irina Bilim («Vasilij Eroŝenko — esperantisto, muzikisto, poeto, sociaganto»).

La raportoj elvokis viglan intereson ĉe la publiko. Tuj aperis novaj adeptoj de Esperanto, kiuj decidis lerni ĝin.

Ek. Majburova

docento en la konservatorio



★ *juna esperantisto* ★

[LA 34-A KONGRESO DE TEJO ESTAS SUR LA SOJLO]

La 34-a kongreso de TEJO estas jam ne slogano, sed io reala, kio proksimiĝas pli kaj pli ĉiun tagon. Kelkcentoj da junaj esperantistoj el dekoj da landoj kolektiĝos en la romantika antikva urbo Veliko Târnovo — la ĉefurbo de la Dua Bulgara Ŝtato — kaj kongresos de la 22 ĝis la 29 de aŭgusto. La konfido de TEJO estas alta honoro kaj respondeco por la bulgara E-junularo, kiu antaŭ 15 jaroj montris sian grandan gastamon.

Veliko Târnovo jam atendas siajn gastojn. Krom siaj naturbelaĵoj ĝi montros al ili antikvajn restaĵojn kaj samtempe tre bonajn kondiĉojn por laboro kaj ripozo. La Universitato „Kiril kaj Metodij“ malfermos gastame siajn pordojn. La studenta loĝejo en la universitata urbeto, la kluboj por estetika edukado, la junulara domo ktp. estos ankaŭ je ilia dispono. La vesperoj estos plenaj je variaj aranĝoj — koncertoj, teatraj prezentoj, in-

ternacia vespero, bulgara vespero, amuzoj. Ekskurso montros la belegan ĉirkaŭaĵon de Târnovo, la faman ĉefurbon de la humuro Gabrovo, la vivan etnografian muzeon en Etâra, la originalan arkitekturan stilon de Bojenci, la heroan montosupron Stoletoŭ ka.

Por la realigo de ĉiuj ĉi bonaj ideoj tamen estas necesa serioza laboro. Necesa estas la helpo kaj la iniciatemo de ĉiu el vi, karaj junaj geamikoj-esperantistoj! La Organiza Komitato de la 34-a kongreso de TEJO akceptos kun granda danko ĉiujn bonajn proponojn pri helpo kaj novajn ideojn, kiuj kontribuos por la sukcesa solvo de la multaj kaj variaj taskoj.

La 34-a estas sur la sojlo! Ni esprimas firman kredon, ke la junaj bulgaraj esperantistoj faros ĉion eblan por ĝia inda preparo kaj realigo.

Al laboro — entuziasma, sindona, obstina!

Dimitro Papazov
prezidanto de LKK

LA 33-A KONGRESO DE TEJO

De la 9 ĝis la 16 de aŭgusto en Puatje (Poitiers), Francio, okazis la 33-a kongreso de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). La malnova, kun tre riĉa historio urbo malfermis siajn pordojn por 287 junaj geesperantistoj el 24 landoj.

Jam la unuan tagon la kongresanoj konatiĝis kun la vidindaĵoj de la urbo. De la dua ĝis la lasta kongresa tago funkciis 7 laborgrupoj kun aktualaj temoj: «Junularo kaj malarmado», «Esperanto kaj la rajtoj de la popoloj», «Perspektivoj por la junulara gazetaro en la internacia lingvo» ka. Ĉiuvespere estis interesaj programoj: de E-teatro el Parizo, literatura vespero el originalaj verkoj, kabareda vespero ktp.

Tuttaga aŭtobusa ekskurso okazis en la orienta parto de la regiono Puatu (Poitou), kie oni vidis pitoreskajn valojn, malnovajn kastelojn, preĝejojn, monumentojn ka.

La bulgaraj esperantistoj organizis standon, kie ili montris multajn prospektojn pri nia lando kaj Veliko Târnovo — la urbo de la TEJO-kongreso en 1978. La prezidanto de BEJ Dimitro Papazov prelegis je temo «Bulgario — la lando de la 34-a». La stando kaj la prelego vekis grandan intereson al la estonta kongreso. Multaj estas la dezirantoj veturi al nia lando.

Post la kongreso pluraj el la kongresanoj vizitis Parizon, kie ili ĝuis la vidaĵojn de Notr Dam, Luvro, la Arko de la Triumfo, la Ajfel-Turo, Versajlo ka.

Ni dankis al la organizantoj de 33-a TEJO-kongreso kaj de la postkongresaj tagoj kaj ni diris: «Ĝis revido Francio! Ĝis nova renkontiĝo en Veliko Târnovo, geamikoj!»

Gento Cokanov



En la vespero de la 16-a de julio belsonaj Esperantaj marŝkantoj igis la loĝantojn de v. Debnevo, Loveĉ-distrikto, eliri sur la stratojn kaj observi imponan torĉprocesion. Solene oni inaŭguris la Arkeologian E-Brigadon. Ĝin partoprenis 52 mezlernejanoj el Devin, Dospat, Haskovo, Loveĉ, Madan, Pazarĝik, Peŝtera, Vraca, Sofio. La brigadanoj metis florkronon antaŭ la monumenton de la pereintaj partizanoj el Debnevo. Pri la partizana vivo kaj batalo rakontis surloke la malnova esperantisto Pejo Dulev, partopreninto en la batalo kontraŭ la faŝismo. Baj Pejo, kiel ĉiuj nomis lin, estigis la plej bona amiko de la junaj esperantistoj. Li ankaŭ laboris sur la arkeologia objekto. La gejunuloj ŝatis aŭskulti liajn versaĵojn kaj la ludon de lia malnoveta klarneto. Ili trarigardis la muzean kolekton, kiun preparis li mem kaj pri kiu povus fieri ĉiu urbo.

La laborobjekto estis malnova fortikaĵo de tri masonitaj spiralfarmaj muroj. Plej valoraj trovitaĵoj estis el la tempo de la

bulgara reĝo Ivan Aleksandro. Jam la unuan tagon okazis io ĝojiga: la brigadanoj trovis antikvan ormoneron! Sekvis trovoj de ora ringo, de malnovaj ornamaĵoj el fero kaj kupro, de romia ceramikaĵo ka.

Ĉiutage posttagmeze ĉiuj rapidis al la puraj akvoj de rivero Vadima por banado, naĝado, fiŝkaptado. Okazis konkuradoj de retpilko kaj futbalo kun junuloj el la vilaĝo, kun brigadanoj el la Matematika Gimnazio de Loveĉ. Vespere — kino, kulturprogramoj aŭ simpla restado sur la benkoj antaŭ la loĝejo, kie ĉiam aŭdiĝis gitaro kaj kantoj. La lingvon oni lernis en kurso, gvidata de k-dino Jordanka Peŝeva, kaj perfektigis sian parolkapablon en amikaj konversacioj.

Post la brigado la junaj geesperantistoj faris grandan eksursion al Pleven, Gabrovo, Sipka, Stara Zagora ka.

Ĉiuj forveturis al siaj loĝlokoj kun la espero, ke ili denove renkontigos dum novaj E-arangoj.

Daniela Atanasova
Ivan Vojnov



Lige kun la 65-a datreveno de la naskiĝo de Nikola Ŝopov kaj 36-jariĝo de lia heroo morto

Nikola Ŝopov (1912—1941) — aginto de la Sendependaj Laboristaj Sindikatoj (NRPS). Sekretario de la Bulgara Laborista Esperanto-Asocio (BuLEA). Membro de kontraŭfaŝista batalgrupo en Sofio. Areslita la 27-an de septembro 1941, li estis kondamnita je morto kaj pendumita la 15-an de novembro s. j. en la Sofia Centra Malliberejo.

Nikola Aleksiev

KOLORRIĈA FIGURO*

Nikola Ŝopov estis kolorriĉa junula figuro. Vigla, moviĝema, laborama, preskaŭ ĉiam ridetanta, li laŭ plej natura maniero transdonadis sian humoron al la ĉirkaŭantoj. Nikola estis tre sciama kaj klopodis kompletigi sian nesufiĉan instruitecon per aktiva memklerigo. Li legis belartan literaturon, sekvis regule la laboristklasan gazeton. Ŝopov kun granda entuziasmo komencis lerni Esperanton.

Por pli bone kompreni la kulturajn strebojn de Nikola Ŝopov, oni devas pense reveni al la tempo antaŭ kvar jardekoj, kiam la juna laboristo estis

por la kapitalisto nur rimedo elpremi pli da profito. Labori en fabriko, helpi la vivtenon de sufiĉe granda laborista familio, klerigi sin mem, dediĉi parton de sia malmulta libertempo por diversaj taskoj de la laboristaj organizaĵoj, lerni fremdan lingvon ne havante la eblecon enprofundiĝi en sian propran gepatran lingvon — tion povas fari nur nature inteligenta, firmavola, konscia junulo. La cirkonstancoj por tia laboro estis tre pezaj ankaŭ el alia vidpunkto: en ĉiu pli sciama laboristo la ĉashundoj de la kapitalistoj kaj la policaj agentoj vidis „danĝeran elementon“, nunan aŭ estontan „ribelemulon“, „malkontentulon“. La faŝistoj ne indulgis ankaŭ tiujn,

* El la libro «En la vicoj de la klaso» de N. Aleksiev, Proizdat, 1977 (vd. la recenzon en BE n-ro 9, 1977).



kiuj partoprenis la kursojn de la Laborista E-Asocio por lerni la lingvon ligitan kun la ideo de internacia kompreniĝo, de paco kaj amikeco — kontraŭ la predikoj de rasismo, ŝovinismo kaj faŝismo. Nikola Šopov anticipe sciis, ke la lernado de Esperanto ne estos por li simple unu trankvila kultura okupo, sed malgraŭ tio komencis kun profunda konvinko viziti regule E-kurson kaj labori neordinare diligente. Aliloke mi rakontis, kiel pasis la lernohoroj de la kurso kaj kunkia suspektemo la polico rilatis al la agado de LEA, batante ĝismorte ĝiajn aktivulojn, konfiskante ĝiajn eldonaĵojn kaj ĵetante en malliberejon la respondecajn redaktorojn kaj la faktajn gvidantojn. Ĉi tie mi nur deziras noti, ke la entuziasmo kaj la diligenteco de Nikola Šopov altiris la atenton de LEA kaj fininte la kurson li tuj estis ŝargita per konkreta laboro en la Sofia Laborista E-Societo.

Por la kresko de Nikola Šopov multe helpis tiel la familia medio, kiel ankaŭ la cirkonstancoj en la laborista kvartalo „Konjovica“, kie ofte okazis laboristaj demonstracioj. Ĉi tie troviĝis ankaŭ la fama „salono“ de legejo „Hristo Botev“, en kiu kontraŭfaŝistaj kaj aliaj progresemaj kaj demokratiaj organizaĵoj efektivigis diversajn kulturiniciatojn. La prelegoj de elstaraj gvidantoj de la laborista kulturfronto, de junaj, sed jam populariĝintaj proletaj verkistoj, artistoj, ĵurnalistoj helpis la sciamajn gejunulojn kreski ideo kaj politike, disvolvi siajn revoluciajn virtojn.

Tiutempe en Usono estis muntita provoka proceso kontraŭ grupo de

junaj negroj, kulpigitaj senargumente, ke ili tuŝis la ĉastecon de blanka virino.

La patrino de unu el la akuzataj junuloj entreprenis — helpe de progresemaj orsanizaĵoj — specialan vojaĝon tra Eŭropo por konigi al la publika opinio la senkulpecon de la ĵetitaj en malliberejon kaj minacitaj per mortverdiktaj junuloj. En Sofio la partino estis renkontita kun eksterordinara sincero malgraŭ la nekaŝita malamikeco de la ĉefurba polico. Šopov partoprenis la surstratajn manifestadojn de simpatio al la negra virino, kies filo kuŝis en malliberejo. Kaj ĉar li mem havis densan brunan koloron de la vizaĝo, ni ŝerce nomis lin „Tom“ — laŭ la nomo de unu el la akuzataj negraj junuloj. Tiun nomon Nikola kun fiero portis, ĉar li mem estis viktimo de la kapitalista ekspluatado kaj el tutkoro simpatiis al la persekutata en Usono negra loĝantaro. Post lia heroa morto la Esperanto-poeto Asen Grigorov verkis pri li poemon sub la titolo „Tom“...

Nikola Šopov kreskis en la laborista movado rapide, kiel oni diras — ne per tagoj, sed per horoj. Tial post kiam mi estis ĵetita en malliberejon, li estis elektita kiel sekretario de Bulgara Laborista E-Asocio. Kaj li plene meritis la konfiditan taskon.

La kuraĝa, heroa agado de Nikola Šopov kontraŭ la germanaj kaj bulgaraj faŝistoj, lia stoika sinteno antaŭ la juĝistoj-ekzekutistoj, kiuj forprenis lian belegan junan vivon, liaj antaŭmortaj leteroj kaj vortoj montras, kia arda patrioto-komunisto estis forŝirita el niaj vicoj.

Estante juna patro de sia familio, Nikola Šopov skribis el la policejo kaj el la malliberejo plurajn leterojn sekrete elportitajn. Unu el ili, kiun li ĵetis tra la fenestro, estis adresita jene: «Bonaj homoj, mi petas, transdonu ĉi tion al unu malfeliĉa patrino!» Kaj efektive bonaj homoj patriotoj ĝin transdonis al lia familio. Tiuj leteroj estas kortuŝaj dokumentoj pri la vira kuraĝo kaj senfina amo de nia karmemora samideano

Nikola Šopov.

Ĉi suban leteron, kiu estas skribita en mortoĉelo kaj havas la karakteron de taglibro, donas bonan ideon pri la oferoj, kiujn devis doni la bulgaraj kontraŭfaŝistoj en la kruela batalo. En ĝi estas menciita la nomo de Botuŝev — alia heroo-martiro, gvidanto de la batalgrupo, ekzekutita kune kun Šopov kaj kun aliaj liberecbatalantoj.

„11.XI.1941. Hodiaŭ estis konfirmita mia mortverdikto. Kuraĝon! Mi pasigas la unuan nokton kun ŝnuro ĉirkaŭ la kolo. Bonan nokton, miaj karaj edzino kaj patrino, bonan nokton, miaj karaj infanoj! Memoru vian paĉjon! Pardonu pro la alarmoplenaj horoj, kiujn vi kune kun mi travivos, ĝis tiu ĉi stato inter la vivo kaj la morto finiĝos. Ankoraŭfoje pardonu!»

«12.XI.1941. Mi ne pensas pri la morto. Mi pensas pri vi kaj la infanoj, Beka¹. Vi devas vivi por la infanoj kaj por vi mem.

Botuŝev montris al mi fotojn de siaj infanoj. Kiel forte li ilin amas! Mi ankaŭ ne malpli forte amas mian familion. Katja-Nikolinjo, Niŝko, miaj karaj infanoj, via paĉjo treege vin amas, li nur pri vi pensas. Sed mi devas morti. Iun tagon vi ekscios, kial via paĉjo devis morti. Memoru, ke via paĉjo krom vin amis ankaŭ sian popolon kaj en la popolo li vidis vin. Mi mortas, por ke vi povu vivi, miaj karaj! Mi kisas vin.

Nikola Ŝopov.“

¹ Beka — la juna edzino de Nikola Ŝopov.

S. Podkaminer

SOCIALISMO KAJ INTERNACIA LINGVO

(Daŭrigo el n-ro 10)

5. La internacia lingvo en la socialisma socio

Nur en la socialisma socio estas kreataj ĉiuj objektivaj kondiĉoj por la venko de la internacilingva ideo.

La bezono de internaciaj ligoj atingas altan nivelon en la sfero de politiko, scienco, tekniko, arto, sporto kaj aliaj sferoj. Precipe gravan rolon ĉi-rilate ludas la socialisma kulturo kaj la rapida kresko de la kulturnivelo kaj kulturbezonoj de la plej vastaj popolamasoj. Senpaga kaj eĉ subvenciata sistemo de klerigado donas al ĉiu civitano de la socialisma ŝtato la eblon atingi la deziratan de li gradon de kultura kaj faka konoj, samtempe kreskigante ĉe li la aspiron konatiĝi kun aliaj landoj kaj popoloj. La neceso ekposedi internacian komprenigilon fariĝis pli kaj pli akre sentata.

Plej klare tiun ĉi neceson esprimis la fama rusa verkisto Maksim Gorkij, konvinkita adepto de Esperanto:

«Por la triumfo de la kulturo ni faras revolucion, elspezas ĉiujn fortojn de nia racio, de nia volo, oferas nian personan liberon, vivon. Ĉu oni povas nei, ke lingvo, unu por ĉiuj, donos potencon impeton al la proceso de la kultura evoluo? Oni ne povas. Sekve oni devas agnoski necesa la kreon kaj la evoluon de tiu ĉi lingvo.»¹

La socialismo senmalhelpo kaj vaste evoluigas ĉiujn produktivajn fortojn, speciale la sciencon kaj teknikon, inkluzive tiun de transporto kaj komunikiloj. Liberigita de la ĉenoj de privata posedo, la tekniko po-

vas plej larĝe servi al la kontentigo de materiaj kaj kulturaj bezonoj de la tuta popolo. Pli perfekta kaj malplikosta transporto altiros milionojn da socialistlandanoj al internacia turismo, postulonta pli kaj pli la aplikon de la internacia lingvo. Ĝi estas ekstreme grava por la rapide evoluantaj radio kaj televido, kiuj dank'al la internacia lingvo fariĝos vere internaciaj komunikiloj, ne plu bremsataj de la multlingveco.

Ne estas mirinde, ke komencante de la XIX-a jarcento kaj ĝis nun homoj, kiuj partoprenadis la porsocialisman lukton, ofte esprimis la komprenon pri la neceso kaj graveco de internacia lingvo por la socialismo.

Dum la Internacia Laborista Konferenco en Londono en 1871 Karl Marks diris, ke la internacia unuigo de profesiaj sindikatoj estas malhelpata de la ingvodiverseco.²

La problemon pri internacia lingvo pridiskutis la II-a kongreso de la I-a Internacio, okazinta en Svisio en 1867. Estis akceptita rezolucio, defendanta la ideon pri internacia lingvo:

«La kongreso konsideras, ke universala lingvo... estus komuna bono kaj tre helpus unuigon de popoloj kaj fratecon de nacioj.»³

¹ „Esperantista Movado“ n-ro 1—2, 1921.

² Marx/Engels: Verkoj, vol. 17, p. 644 (rusa eldono).

³ Procès verbaux du congrès de l'Association Internationale des Travailleurs réuni à Lausanne de 2 ou 8 septembre 1867, Chaux-de-Fonds, p. 52.



La II-a kaj la III-a kongresoj de la Komunista Internacio (1920 kaj 1921) havis en siaj tagordoj punktojn pri Esperanto kaj pri lingvo internacia (resp.)⁴

Estas ankaŭ ne mirinde, ke tri grandaj verkistoj-socialistoj: Maksim Gorkij, Roman Rolan (Romain Rolland) kaj Anri Barbjus (Henri Barbusse) multfoje esprimis senkondiĉan subtenon al Esperanto.

En ĉiuj socialistaj landoj la esperantistoj ricevas malavaran subtenon de la registaroj: ili uzas senpagajn, komfortajn ejojn por kunvenoj, la ŝtatoj prenas sur sin ĉiujn elspezojn por eldonado de lerna, beletra, politika literaturo en Esperanto. La plej multnombraj universalaj E-kongresoj okazas en la socialismaj landoj.

Tamen aperas motivita demando: se la socialisma socio kreas ĉiujn objektivajn kondiĉojn por definitiva venko de la internacilingva ideo, kial do en neniuj socialisma lando Esperanto ĝis nun estas oficialigita kiel ŝtata lingvo en la eksteraj rilatoj? Kial eĉ tiuj socialismaj ŝtatoj, kiuj plej forte subtenas la E-movadon (Bulgario, Hungario, Pollando) ne enkondukis Esperanton en siajn lernejojn kiel devigan lernobjekton?

Oni ne devas forgesi, ke la problemoj de la larĝskala apliko de Esperanto en ĉiuj vivsferejoj tutmonde estas ne solvebla nur de kelkaj ŝtatoj, sed devas ricevi la aprobon kaj subtenon flanke de la plimulto aŭ almenaŭ de relative granda kvanto da ŝtatoj.

Ĝis tiu ĉi evento vencs, daŭros la prepara periodo, dum kiu apartaj socialistaj registaroj subtenados la E-movadon, depende de la aktiveco de la esperantistoj, pruvantaj la kapablon de Esperanto bone servi al la efektivigo de la ideoj pri paco, libero, sendependeco kaj al la aliaj ideoj, konsistigantaj la kernon de la ekstera politiko de la socialismaj ŝtatoj.

Ĝis nun ni parolis pri la *objektivaj faktoroj*, helpantaj aŭ malhelpantaj la progreson de la internacilingva ideo. La *objektivaj faktoroj* estas tiuj, kiuj ekzistas kaj funkcias sendepende kaj ekster la volo de homoj, klasoj, partioj, grupoj ktp. Ni penis prui, ke nur en la socialisma socio ekzistas ĉiuj kondiĉoj necesaj por la definitiva venko de Esperanto.

Sed krom la *objektivaj faktoroj* tre gravan rolon en la homa socio ludas la *subjektivaj faktoroj*, dependantaj de la volo de homoj. La *subjektivaj faktoroj* povas koincidi aŭ ne koincidi kun la *objektivaj*. La decida rolo apartenas finfine al la *objektivaj faktoroj*, sed la *subjektivaj* povas helpi kaj plirapidigi la efektivigon de tiu aŭ alia ideo, por kiu la *objektivaj faktoroj* kreis favorajn evolukondiĉojn, aŭ, kontraŭe, *provizore*

⁴ 10 jaroj de Komintern en decidoj kaj ciferoj, ŝtata endonejo Moskvo-Leningrado, p. 33, 34, 52, 58.

bremsi kaj malrapidigi la proceson de la efektivigo. Ofte la *subjektivaj faktoroj* estas dividataj rilate tiun aŭ alian ideon je du reciproke kontraŭajn grupojn: unuj subtenas la ideon, aliaj kontraŭbatalas ĝin. Inter tiuj du grupoj aperas lukto, kiu povas daŭri tre longe kaj pasi en tre akraj kontraŭdiroj kaj kunpuŝigoj. Sed la *subjektivaj faktoroj* ne povas venki la *objektivajn*.

La internacilingva ideo, havanta multajn adeptojn kaj simpatiantojn (*pozitivaj subjektivaj faktoroj*), renkontas kontraŭstaron flanke de granda kvanto da kontraŭuloj (*negativaj subjektivaj faktoroj*). Kaj grandega plimulto da homoj, eĉ en socialismaj landoj, ne scias pri la ekzisto de Esperanto aŭ estas tute indiferentaj al ĝi.

La kaŭzo de kontraŭstaro al Esperanto estas nescio, ignorado kaj antaŭjuĝoj. Multaj malamikoj de Esperanto troviĝas en la medio de homoj, kiuj profitas de la multlingveco: instruistoj de fremdaj lingvoj, tradukistoj kaj interpretistoj. Ili havas apogon de relative granda kvanto da lingvistoj, kiuj staras sur la bazo de spontaneco kaj «natureco» de lingvoevoluo, refutas la viveblon de tiel nomataj «artefaritaj» lingvoj kaj konsideras ilin malscienca utopiaĵo.

Tamen necesas noti, ke la nombro da sciencistoj, kiuj ekkomprenis la gravecon de la internacia planlingvo kaj la bezonon serioze pristudi la problemon, kreskas. Tiurilate ekstreme grava evento okazis en Sovetunio, kies Akademio de Sciencoj en 1973 komisiis al sia Instituto de Lingvoscienco organizi esplorkomisionojn en la sfero de la internacia helplingvo kaj studi la problemojn de ĝia uzado en internaciaj ligoj.

La instituto organizis tiucele specialan Probleman Grupon, kiun gvidas la konata lingvisto kaj esperantisto prof. d-ro M. I. Isaĵev.

En 1976 aperis la unua libro, kiel rezulto de la agado de la Problema Grupo — «Problemoj de la interlingvistiko» (Tipologio kaj evoluo de internaciaj artefaritaj lingvoj). La libro forte kaj konvinke subtenas Esperanton kiel praktike nuran internacilingvon. Baldaŭ devas aperi la dua volumo. Estas planita tria kun la provizora titolo «La interlingvistiko nuntempe (Aktualaj problemoj de la planlingvo)».

Forestas la dubo, ke la sukcesa laboro de la Instituto de Lingvoscienco, la plej aŭtoritata en Sovetunio lingva institucio, devigos multajn sovetiajn kaj nesovetiajn lingvistojn, kiuj ĝis nun oponis Esperanton aŭ neglektis ĝin, ŝanĝi sian pozicion.

Inter la politikaj agantoj en diversaj ŝtatoj (inkluzive la socialismajn) oni povas ofte renkonti homojn, kiuj konsideras, ke la problemoj de internacia komunikado estas sukcese solvata pere de kelkaj, tiel nomataj

«grandaj» lingvoj (angla, rusa, franca) kaj ke forestas neceso uzi por tiu ĉi celo Esperanton, kiu estas lingvo uzata nur de malgranda aro da amatoroj, ne havanta kaj ne havonta iun socian signifon. Tiu ĉi vidpunkto, serioze bremsanta la rapidan progreson de la E-movado, povas esti refutita per la aktiva agado de la esperantistoj, kiuj estas la plej grava el la pozitivaj subjektivaj faktoroj en la lukto por la efektivigo de la internacilingva ideo. Ĉiuj ĝisnunaj atingoj de la E-movado estas rezulto de la sindonema, oferema agado de esperantistaj asocioj, grupoj kaj individuoj, superantaj diversajn obstaklojn survoje al la venko.

Por pruvi ke la E-movado jam nun estas grava socia fenomeno kaj ke ĝia signifo grandskale kreskos kun ĝia vastigo, necesas, ke krom jam kutimaj formoj de poresperanta klariga, informa kaj instruagado la E-movado povu sin apogi je la subteno de amasaj, aŭtoritataj internaciaj movadoj, kiuj jam nun povas sukcese uzi la internacian lingvon.

Unu el tiuj ĉi movadoj estas la tutmonda pacmovado. Progresemaĵoj esperantistoj en diversaj landoj jam delonge komprenis la gravan rolon, kiun povas ludi Esperanto por la homaro, strebanta al paco. Ili kreis la Mondpacan Esperantistan Movadon (MEM) kiu, malgraŭ sia ankoraŭ relative negranda disvastigo, havas bonajn atingojn en la apliko de la slogano «Esperanto servu pacon!».

Tiuj ĉi atingoj jam ricevis agnoskon fare de la tutmonda pacmovado. En 1973, dum la tutmonda kongreso de pacamaj fortoj en Moskvo, estis subskribitaj dokumentoj pri kunlaboro kaj interhelpo de ambaŭ movadoj. Unuafoje en la tuta historio de la E-movado ĝi ricevis agnoskon kaj subtenon flanke de unu el la plej fortaj kaj multnombraj movadoj.

Nun necesas transformi la vortojn de la dokumentoj al realaj agoj kaj pruvi, ke Esperanto povas perfekte servi kiel pontlingvo, kunligante diverslandajn pacorganizojn kaj pacaktivulojn, helpante interŝanĝon de iliaj agadspertoj. Necessas, ke progresemaĵoj esperantistoj fariĝu aktivuloj de la pacmovado kaj ke plej multaj el la granda kvanto da pacadeptoj studu Esperanton. Tiam aperos la eblo transiri al la sekvonta etapo de la kunlaboro de ambaŭ movadoj: akceptigi Esperanton kiel unu el la laborlingvoj de la tutmonda pacmovado.

Modelo de tiu esperantista agado devas esti montrita unuavice en la socialismaj landoj, en kiuj la esperantistoj posedas la plej favorajn kondiĉojn, ĉar la socialismaj ŝtatoj forte kaj senrezerve subtenas la pacmovadon.

La sukcesoj de Esperanto en la pacmovado stimulos aliajn tutmondajn progresemaĵojn movadojn sekvi la ekzemplon.

La moderna internacia situacio, karakterizata per maltensio de la internacia atmosfero, malpligrandigo de la militminaco, progreso de la ideo de paca kunekzistado de ŝtatoj kun diversaj soci-ekonomiaj sistemoj, kreas favorajn kondiĉojn por la sukcesa agado de la esperantistoj malgraŭ la streboj de la reakciularo revenigi la homaron al la «malvarma milito».

Antaŭ ĉiuj progresemaĵoj E-organizaĵoj kaj esperantistoj la nuna momento starigas jenajn ĉefajn taskojn: ĉiumaniere helpi la realigon de la decidoj de Helsinki-Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro, la kolektadon de subskriboj sub la Stokholma Alvoko pri malgrandigo de la vetarmado kaj malarmigo kaj efektivigo de la Deklaro pri kunlaboro inter la Tutmonda Pacmovado kaj la Mondpaca Esperantista Movado.

El „Paco“ — eldono de Centra Laborrondo Esperanto de GDR

PUBLIKA REKONO DE LA ESPERANTISTA AGADO EN GDR

En GDR ekzistas tre populara organizaĵo sub la nomo Kulturbund (Kultura Ligo). Ĝi daŭrigas malnovajn kulturajn tradiciojn de la germana laborista klaso el la epoko de kapitalista reĝimo. En la nunaj tute novaj sociaj kondiĉoj en GDR tiu organizaĵo sukcese ludas ekstreme gravan rolon en la kultur-eduka laboro de la intelektularo inter la vastaj popoltavoloj. Ne hazarde la Naŭa Kongreso de Kulturligo altiris la atenton de la tuta publiko en la respubliko kaj de esksterlandaj rondoj.

Centra Laborrondo Esperanto de GDR kune kun multaj aliaj kulturaj organizaĵoj agadas en la kadro de Kulturligo. CLE aktive partoprenis ankaŭ en la preparlaboroj kaj en la okazigo mem de la Naŭa Kongreso.

En la estrarraporto antaŭ la kongreso oni

publike emfazis la pozitivan laboron de CLE. En ĝi troviĝas multaj ekzemploj kaj ĝeneraligaj statistikaj ciferoj pri la agado de la esperantistaro en GDR. Tiamaniere la kongreso publike esprimis rekonon al CLE pro ties laboro en la intereso de la socialisma eduko de la laboruloj en GDR.

En la lukse eldonita volumo (germanlingva) «La Kulturligo en la evoluanta socialisma socio», pritraktanta la agadon inter la Oka kaj la Naŭa Kongresoj de la Ligo, estas publikita kvinpaĝa ekstrakto el la raporto de k-do Rudi Grec (Graetz) antaŭ la Dua Landa Konferenco de CLE en Lajpcigo (1976).

En la kongresa prezidio troviĝis ankaŭ k-do Grec. Li estis reelektita en la nova estraro de la Kulturligo.



Kiel nonora gasto de la kongreso estis invitita la prezidanto de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) kaj membro de la Monda Packonsilio Nikola Aleksiev. Li estis varme salutita de la kongresanaro — esprimis simpatio al la agado de MEM kaj ties aktiva porpaca laboro.

La Naŭa Kongreso de Kulturligo montris denove, ke la esperantistaro en GDR posedas bonegajn eblecojn agadi sukcese en la vicoj de tiu plej prestiĝa kultura unuiĝo de GDR, utiligante ties riĉan materialan bazon — klubojn, librovendejojn, salonojn, restoraciojn.

N. B.

Noto de la redakcio. Kiam tiu ĉi materialo estis jam knmpostita, venis al ni la ege malĝoja informo pri la forpaso de la ŝatata prezidanto de CLE k-do R. Grec.

Verdaj steletoj

Bulgaraj junpioniroj-esperantistoj ekskursis eksterlande

Ĉi-jare grupo de junpioniroj-esperantistoj el Smoljan-distrikto, precipe el u. Madan, somerumis en 12-taga tendaro en Pollando kune kun hungaraj kaj polaj gelernantoj. La veturado per aŭtobuso donis al la bulgaraj junpioniroj eblecon viziti kelkajn landojn — Rumanion, USSR, Pollandon, Ĉeĥoslovakion, Hungarion, Jugoslavion.

En Varsovio ili vizitis la tombon de Zamenhof kaj honore metis florojn sur ĝin.

En Hungario la junpioniroj prezentis florojn antaŭ la tombojn de la bulgaraj soldatoj ĉe Harkani, proksime de Peeĉ (Pécs).

G. Harizanov

DEK JAROJ DE PIF EN ZAGREB

Granda sukceso de la pupteatro de Varna

La ĉi-jara Pupteatra Internacia Festivalo en Zagreb okazis komence de oktobro. Partoprenis pupteatroj el Jugoslavio, Rumanio, Pollando, Alĝerio, Bulgario. Tio estis bonega manifestaĵo de la puparto, riĉa je majstreco kaj entuziasmo, manifestaĵo de internacia Esperanto-kulturo. Sur la scenejo sonis la lingvo Esperanto, la spektantoj — infangrupoj el Jugoslavio, Hungario kaj Italio — estis konantoj de Esperanto. Tiuj malgrandaj esperantistoj konsistigis ankaŭ internacian ĵurion, kiu decidis sian premion.

Kafejo „Esperanto“ en Vroclavo

La direkcio de la Vojevodia Konsum-Kooperativo „Spolem“ en Vroclavo donis la nomon „Esperanto“ al tute nova kafejo. Ĝi situas en moderna kvartalo proksime al la Ĉefa Stacidomo. La menuo kun E-informilo estas presata dulingve kaj la kelnerinoj pri-servadas la gastojn uzante la Internacian Lingvon. En la kafejo troviĝas anguleto kun E-gazetoj.

Sendu gratulojn al adreso: Kafejo „Esperanto“, str. Komandarska 147, PL 53-344 Wroclaw. Vroclavo estas grava turisma centro, miljara urbo kun multaj antikvaĵoj, situanta ĉe kruciĝo de internaciaj aŭtovojoj: E-12, E-22, kaj E-83. Pri la tranokteblecoj informas: Vroclava Esperanto-Klubo, PL 50-952 Wroclaw 17, str. Dubois 3, tel. 22-69-54.

Harijs Skuja — E-poeto

En Riga estas eldonita en latva lingvo versaĵkolekto de latva poeto Harijs Skuja „Super montara transirejo“.

La latvaj esperantistoj legante la versaĵojn estis ĝoje surprizitaj, ĉar en la libro ili trovis koron ravan tan versaĵon «Kredo al la verda stelo».

Harijs Skuja nelonge ekpenseĉis Esperanton. Ni deziras al li bonajn sukcesojn!

Solvo de la enigmo „En kiu jaro...“, № 7/8

La jaroj estas: 1) 1859, 2) 1905, 3) 1929, 4) 1896, 5) 1832, 6) 1893, 7) 1912, 8) 1908, 9) 1891, 10) 1930, 11) 1914, 12) 1899, 13) 1925, 14) 1925, 15) 1927, 16) 1917.

La studenta klubo en Zagreb organizis en 1967 la Unuan Pupteatran Internacian Festivalon. Kuraĝigita de la sukceso la klubo komitato decidis fari la aranĝon ĉiujara. Nun PIF estas oficiale sub la aŭspicio de la Jugoslavia sekcio de UNIMA.



La unua partopreno de bulgara pupteatro estis jam en la unua jaro de PIF (1968): «La ora knabino» — aŭtoro P. Mančev, tradukinto kaj E-lingva gvidanto A. Anev, rolantoj — geartistoj el la Centra Pupteatro de Sofio: ĝi gajnis premion. Sekvis preskaŭ ĉiujare partoprenoj de bulgaraj pupteatroj ornamitaj per premioj: Ruse, Burgas, Sofio (Centra Domo de la Instruisto), Plovdiv, Stara Zagora, Sliven (kun la unua granda premio por la spektaklo «La eta princo» laŭ la samnoma romano de Sen Ekzjuperi kun reĝisoro Zlati Zlatev kaj pentristo Ivan Cenev).

Duan fojon Zlatev kaj Cenev preparis la fabelon «La dormanta belulino» de Jivko Sotirov laŭ la samnoma fabelo de Sarl Pero (Charles Perret) por la ĉijara partopreno de la Stata Pupteatro de Varna en PIF. La muzika elformado apartenas al Malina Mihalkova, la tekston esperantigis K. Draĵev.

Ĉiu renkontiĝo kun la sceneja arto estas festo. Sed tiu festo estiĝas pli kortuŝa, pli

granda, kiam ĝi estas lumigita de brilo de infanaj okuloj, de entuziasmaj aplaŭdoj, de sinceraj salutvortoj de gekolegoj. La raven de la publiko elvokis ne nur la poezio de la konata fabelo, sed ankaŭ la arto de la pupistoj, la originaleco de la pentristo, la eleganteco de la reĝisorado, la stilo de la muziko, la belsona lingvo Esperanto.

Serioza kaj streĉa estis la preparlaboro de la teatraĵo «La dormanta belulino» — kaj aktore, kaj lingve. Pro tio PIF ornamis la artistojn per tri premioj:

Unua premio en A-sekcio «Pupoj parolas al infanoj».

Unua premio pro kvalita scena Esperanto, surbendigata.

Premio por Galja Peeva pro modela parol-esprimo.

«La dormanta belulino» ĉarmos nin ankaŭ en la venonta UK de Esperanto en Varna.

Belka Beleva

FORPASIS RUDI GRAETZ (1907—1977)

La 1-an de oktobro 1977 post subita kaj mallonga malsanado forpasis Rudi Grec (Graetz), prezidanto de Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR. Lia perdo estas forta bato por la E-movado en GDR, kiun li kunkreis per sia integra personeco. En Rudi Grec harmonie kunigis la revolucia sperto de la iama laborista esperantisto kun larĝhorizonta akceptemo por la progresema novo.

Rudi Grec estis membro de la Internacia komitato de MEM, membro de la Komitato de UEA kaj en multaj kongresoj kaj internaciaj renkontiĝoj gvidis la E-delegitaron de GDR. Modesta kaj ĉiam afabla homo, energia aktivulo, vera komunisto, li sin plene dediĉis al la konstruado de la E-movado en GDR.

Rudi Grec multe verkis por «Paco» kaj «der esperantist» kaj ofte prelegis en internaciaj kaj naciaj kunvenoj.

Alte distingita de la ŝtato kaj de sociaj organizaĵoj, li apartenis al la plej bonaj reprezentantoj de nia lando. Li estis gvidanto de la komercaj reprezentejoj de GDR en Islando kaj Danio kaj post pensiuliĝo aktivis ne nur por Esperanto, sed ankaŭ en necesperantistaj sociaj aferoj, i. a. kiel membro de la Packonsilantaro de GDR kaj la GDR-Komitato de iamaj Antifaŝistaj Rezistbatalantoj.

Ni honorigos lian heredaĵon laborante plu en lia spirito!

**Centra Laborrondo Esperanto,
en Kulturligo de GDR**



*

La Estraro de BEA kaj la Redakta Komitato de «BE» kun profunda ĉagreno akceptis la sciigon pri la forpaso de k-do Rudi Grec — la prezidanto de Centra Laborrondo Esperanto de GDR. K-do Grec estis aktiva kontraŭfaŝisto, arda pachtalanto, sindona kaj iniciatema esperantisto, nobla homo. Kaj ankaŭ: sincera amiko al la bulgaraj esperantistoj, al la bulgara popolo, al Popola Respubliko Bulgario! Lia vivo kaj agado lasas helajn spurojn en la E-movado en GDR kaj la socialismaj landoj.

Plej sincerajn kondolencojn al niaj germanaj geamikoj-esperantistoj kaj al la familianoj de Rudi Grec!

**Estraro de BEA
RK de „Bulgara Esperantisto“**

La 8-an de oktobro en sia 82-jaraĝo forpasis en Plovdiv la malnova esperantistino, multjara ano de la estraro de E-societo «Kulturo»

Roza Georgieva Dramova

Pu ŝia milda karaktero kaj bona koro, pri ŝia sincera kaj sindona partopreno en la E-movado restos longe n rememoro ĉe la esperantistoj.

Atentigo

Ni petas pardonon pri kelkaj eraroj de la preseo. Sur la 2-a kovrilpaĝo elfalis literoj kaj estis metitaj neĝustaloken. Same en la materialo de P. Taŝkov, paĝo 3, kolumno 2, literoj 2, 3, 8, 9. —